

Ekzameno, 1a nivelo,

skriba parto

Trejnado: diktaĵo (1-a grado)

Entraînement : dictée

Ĉu ludi aŭ ne ?

« Ne ludu ĉiam! Vi jam ne estas infano. ». Oni ofte aŭdas tiun atentigon, kvazaŭ ludo estus malutila aŭ rekte danĝera agado. Plenaĝulo ofte forgesas kiom li aŭ ŝi povas danki al diversaj ludoj. Dank'al ludado oni lernas kuri, kapti, ĵeti, grimpi, serĉi, kaŝi, ŝerci. Prezentu al vi kion infaneto sciis sen ludado!

Laŭ *Juna amiko*.

Por la ekzamenantoj:

1. Oni legu la tutan tekston, por ke la kandidato sciu pri kio temas.
2. Poste alia persono daktu ĝin, vortgrupon post vortgrupo, ekzemple:

Titolo: Ĉu ludi aŭ ne (demanda punkto)

Je nova linio: (malfermu la citilojn) Ne ludu ĉiam (ekkria punkto)/ Vi jam ne estas infano (fermu la citilojn, punkto)/ Oni ofte aŭdas / tiun atentigon (komo)/ kvazaŭ ludo /estus malutila / aŭ rekte danĝera agado (punkto)/ Plenaĝulo ofte forgesas / kiom li aŭ ŝi povas danki / al diversaj ludoj (punkto)/ Dank'al ludado / oni lernas kuri (komo)/ kapti (komo) / ĵeti (komo) / grimpi (komo) / serĉi (komo) / kaŝi (komo) / ŝerci (punkto) / Prezentu al vi / kion infaneto sciis / sen ludado (ekkria punkto) /

3. La unua persono relegu la tutan tekston.

Nenio pli! Oni ripetu nenion laŭ peto de iu kandidato!

La kandidato devas koni la interpunkcion, kaj la specifajn esperanto-sonojn.

Diktaĵo enhavu proksimume 50 vortojn.

La folio de la kandidato devas esti nete skribita, prezentita, sen forstrekaĵo.

Kompreno de facila teksto; poste respondu kvin demandojn pri tiu teksto

Texte simple à lire et à comprendre ; répondre ensuite à cinq questions sur ce texte.

Senbrue, kiel ombro, lia servisto Mihok eniris en la ĉambiron. Sub la dekstra brako Mihok premis kelkaj pecojn da ligno; sub la maldekstra, pajlon kaj malnovan gazeton; en la manoj li tenis grandan samovaron. Li penis paŝadi laŭeble senbrue kaj piedpinte. Li time kaj respektplene rigardis al la lito, kie sub la kovriloj kuŝis la sinjoro leŭtenanto. Mihok laŭnature estis timema, servema kaj ĝentila. Li timis precipe leŭtenanton Petroff, kiun li konis nur de tri tagoj. Escepte kelkajn frazojn, li ne komprenis la rusan lingvon. Li bonvole klopodis plenumi la dezirojn de la leŭtenanto, sed la timo ofte paralizis lin.

Respondu al tiuj kvin demandoj per kvin frazetoj (/20 poentoj):

Répondez à ces cinq questions par cinq petites phrases (/20 points)

1° Kio montras, ke Mihok jam timas, tuj kiam li eniras?

2° Kion Mihok venas fari?

3° Ĉu leŭtenanto Petroff kaj Mihok reciproke konas sin de longe?

4° Citu unu el la kaŭzoj, kial Mihok malbone servas Petroff.

5° Ĉu lia timo helpas al Mihok?

Anstataŭigu la truojn kun punktoj (...) per taŭga vorto aŭ vortfino (/10 poentoj)

Exercice à trous (/10 points). Remplir les trous marqués par 8 points (.....) par la terminaison ou le mot convenable.

La servist..... la leŭtenant..... timas.

Petroff demandas sin, Mihok estas stulta.

Mihok estas la pl..... timoplana servisto.

Ki..... estas samovaro? Preparilo por teo.

Tia tepreparilo estas tipe rusa. esta utila ilo.

Eĉ en Siberio, ki..... la suno brilas, la ĉielo bluas.

Ĉu vi vidis, ki..... la servisto eniras, por ne vekti Petroff?

La ligno, k..... la servisto portas, estas peza.

Petroff ne konsentas ellitiĝi, ĉar li estas ankoraŭ dorm.....

Plurrespondo : elektu la ĝustan respondon (/10 poentoj).

Choisissez la bonne réponse parmi les quatre proposées (/10 points)

1. Ĉu la sinjorino, ni vidis, estas via fratino ?
- ke -kio -kion -kiun
2. Ana kaj amiko promenas en la arbaro.
-lia -ŝia -sia -ilia
3. Mi demandas min mi jam skribis al li.
-se -kio -ĉu -si
4. Mi devas iri en la urb..... por aĉeti panon.
-o -on -a -an
5. Se vi kon..... lin, vi ne dirus tion.
-is -as -os -us

Premier niveau, partie orale
Unua nivelo, parola parto

Texte -Teksto (silenta, poste laŭta legado : /10 poentoj)

Laŭ vojeto de la vilaĝo Packfield, en la printempo de la jaro 1610, iris virino proksimume tridek-kvin-jara. En korbo ŝi portis diversajn drogherbojn, pri kiuj ŝi havis grandan scion, kaj per kiuj ŝi kutimis kuraci tiujn malsanajn vilaĝanojn, kiuj akceptis ŝian helpon. Baldaŭ ŝi venis al dometo, sur kies pordon ŝi frapis. La pordo malfermiĝis kaj vidigis mezaĝan virinon kies vizaĝo portis liniojn de suferado, sed tuj heliĝis kiam ŝi rekonis la vizitantinon.

"Ha, estas vi, Alicja!", ŝi ridetis. "Vi estas bonvena. Envenu, mi petas."

Alicja Vardon eniris kaj fermis la pordon. "Kiel vi fartas hodiaŭ, Sofia?" ŝi demandis. "Ĉu vi ankoraŭ havas la doloron?"

"Iomete, sed multe malpli. Mi sekvis viajn instrukciojn, ka la medikamento multe helpis."

"Mi ĝojas pri tio. Do, mi donos al vi plian kvanton, faritan el la samaj herboj. Uzu ĝin sammaniere, kaj mi revidos vin post tri-kvar tagoj."

J. H. Sullivan, 1912-1993

Questions sur le texte - Demandoj pri teksto (/10 poentoj)

Au moins cinq questions de compréhension, par exemple :

Almenaŭ kvin demandoj pri kompreno. Ekzemple:

1. Pri kio temas?
2. Kial la unua virino iras al la vilaĝo?
3. Kiel aspektas la dua rolanto?
4. Resumu la dialogon.
5. Kio estas decidite finfine?

Quelques questions de grammaire (exemple)

Kvin (aŭ ses, sep) demandoj pri gramatiko (/10 poentoj).

1. Kial estas skribite *virino* kaj ne *virinon* je la unua frazo?
2. Klarigu kiamaniere estas konstruita la vorto *vilaĝanojn* (je la dua frazo).
3. Klarigu la sufiksojn en *malfermiĝis* kaj *vidigis* (je la kvara frazo).
4. Klarigu la uzadon de la prepozicioj *per* (je la dua frazo) kaj *el* (je la antaŭlasta frazo).
5. *Envenu* (je la dua paragrafo): kial oni uzas la finaĵon *-u*?

Nombres – Nombroj (/10 poentoj)

7 281 453

$44 \times 2 = 88$

03 57 92 03 71 (oni legu laŭ la franca maniero, kiel prezentite).

fraction *frakcio* $8/3$

$458 - 21 = 437$

(1er niveau, exemple d'examen – 1a nivelo, ekzemplo de ekzameno, p. 4)

Images (exemple)-
Bildoj (/ 10 poentoj)

Le candidat devra la (ou les) commenter en espéranto



<http://picto.qc.ca/>